V-20194/63 B (1948)

# AMERICAN ESPERANTIST BULLETIN

Vol. 63B - No. 2    July-August, 1948

## EANA KONGRESO EN TORONTO

by BABI LE MULO

Je la tria fojo en la historio de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko nia Kongreso okazis en Toronto, la bela ĉefurbo de la kanada provinco Ontario, kie EANA ankaŭ festis sian 15-an Kongreson en 1922 kaj sian 27-an en 1934.Esperantistoj el Usono kaj Kanado diskutis urĝajn problemojn de nia movado kaj samtempe pasigis kelkajn agrablajn tagojn en atmosfero amika kaj Esperantista.

Ni ŝuldas grandan dankon al niaj samideanoj en Toronto, speciale al la nelacigebla "trio": F-ino Olive Latimer kaj S-roj Hackett kaj Kaelble.Ili ne nur havigis al ni interesan programon, sed ankaŭ utiligis la Kongreson por efika propagando.Jam antaŭ la Kongreso kanadaj kaj usonaj ĵurnaloj atentigis pri ĝi kaj pri la Esperanto-movado. En unu el la ĉefaj radio-stacioj famkonata programestrino Jane Weston disaŭdigis detalan kaj impresan intervjuon kun George Alan Connor kaj Doris Tappan Connor. Ŝajne ĝi estis tiel interesa, ke alia radio-stacio tuj telefonis al Ges-roj Connor kaj aranĝis Esperanto-programon por lasekvonta tago. La Magazeno T. Eaton, laŭ grandeco la tria en la mondo, presigis stratplanojn de Toronto kun saluto al la Esperanto-Asocio kaj disdonigis ilin senpage inter la kongresanoj.

Publika kunveno okazis en la ekonomia fako de la Universitato sub prezido de F-ino Latimer.Kontrolisto (Vicurbestro) Roelofson salutis en la nomo de la urbestro kaj laŭdis la Esperanto-movadon pro ĝia valoro eduka kaj praktika.D-ro W.Solzbacher,Vicprezidanto de EANA,prelegis pri la lingva problemo en la internacia vivo,precipe en la Unuiĝitaj Nacioj. S-ro Connor, Ĝenerala Sekretario de EANA, klarigis la celojn, organizon kaj praktikajn servojn de la Esperanto movado, kaj S-ino Connor faris provlecionon laŭ la Cseh-metodo. Ĝi estis tiel efika,ke unu el la ĉeestintoj diris:"Ŝi faris miraklon!"

Dum la demando - respondo periodo S-ro Connor kaj D-ro Solzbacher respondis multajn demandojn skribajn kaj buŝajn. Bulgara samideano, S-ro Vasilov,kiu ne estis en kontakto kun la movado en la pasintaj jaroj kaj venis al la kunveno allogite per anoncoj en la gazetaro, rakontis pri siaj personaj spertoj,kiam li venis al Toronto el Eŭropo,ne sciante anglan lingvon, kaj kiam Esperanto helpis lin adaptiĝi al la nova hejmlando.

Dum la publika kunveno oni ankaŭ unuafoje prezentis la novan libron: "Esperanto-The World Interlanguage",kies moderna, praktika kaj alloga aspekto faris bonegan impreson. Ĉiuj ekzempleroj disponeblaj disvendiĝis kiel freŝaj bulkoj, kompreneble kun propramana enskribo de la aŭtoroj.

La 5 aferkunvenoj estis sufiĉe viglaj,sed malgraŭ kelkaj disputoj ĉio finiĝis en harmonio. 13 rezolucioj estas akceptitaj unuvoĉe.Pro foresto de la Prezidanto de EANA,Profesoro Clarke,la Vicprezidanto, D-ro Solzbacher, prezidis la aferkunvenojn. La membroj de EANA jam ricevis cirkuleron kun eltiraĵoj el la diversaj raportoj kaj kun la rezolucioj.

Sukcesa,bongusta kaj entuziasmoplena bankedo okazis sub prezido de S-ro W.Robert Kelly,el Sheridan,Ontario.Tostoj aŭdiĝis honore al la Brita Reĝo, la Prezidanto de Usono,la Kanada Popolo,la Esperanto-movado en Nord-Ameriko kaj la mondo. Belajn paroladojn Esperantlingvajn faris S-ino Doris Connor (por Usono) kaj Pastro R. Edis Fairbairn (por Kanado).

Dum Tutesperanta Kunveno plaĉis precipe paroladeto de S-ro William Vathis el New York pri novaj kaj malnovaj verkoj de la Esperanto - literaturo kaj teatraĵeto ludita de F-ino Latimer kaj S-ro Kaelble.

Ni faris aŭtobus-rondvojaĝon tra Toronto kaj grimpis sur la turon de "Casa Loma",stranga kastelo konstruita de iu riĉegulo, kiu ne sciis kion fari per sia mono. La usonaj kongresanoj treege satis la urbon,ĝiajn enloĝantojn Esperantistajn kaj ne-Esperantistajn, kaj ankaŭ la tieajn bongustajn, grandajn kaj malmultekostajn bifstekojn!

## MOSAMO: Signpost to Progress

In the last issue of the bulletin we reported on the activities of a new Esperanto club at the Missouri School of Mines,under the leadership of John M.Brewer,Professor at the school. We present the following report from the club, which we hope will be of interest and inspiration to Esperantists throughout the country:

In October 1947, a group of students at Missouri School of Mines met with Mr.Brewer to try and organize an Esperanto club. At this meeting a constitution was drawn up patterned after the constitution of EANA adopted at Conway last July. An organizational meeting was planned and publicized. Thirty-seven students attended the first meeting where the purposes of the club were explained,the constitution was adopted and officers were elected.The organization was named Mosamo using the school initials.

Weekly meetings were held with the members studying the language. We used the Szilagyi course for a text and the Edinburgh dictionary. Each member was required to pay an initiation fee;from this the books and dictionaries were bought. By this method it was assured that all would have the same text and the lessons could be learned together. Each member was also required to pay weekly dues of ten cents to pay for refreshments and running expenses. We found the refreshments helped keep attendance up.

The constitution was approved by the faculty committee and a charter granted to the club in February 1948.

In addition to learning the language the club has been working on several projects. An Esperanto library has been started by having all the members keep their books at a central place where they are available for use by all. A radio program was written for use on the local station to familiarize the citizens with Esperanto but unfortunately the time allotted to the school expired before we were able to present it, however we hope to broadcast the program next fall. An attempt was made to record short wave radio broadcasts from foreign countries but this has been unsuccessful because of static difficulties.

The club pays part of each member's fee in the national organization, thus encouraging greater EANA membership. We also gave lapel pins to members with the highest average attendance.

Next fall our expanded activities will include an advanced class as well as a beginners' class.

## SPECIAL BOOK OFFER FOR NEW AND RENEW MEMBERS

The new book,"Esperanto: The World Interlanguage"is off the press and has been sent out to members of EANA who are paid up to January 1949 or longer. The offer is still open for EANA Members to receive this new book free, as compensation for missing numbers of the American Esperantist during 1948. If your membership expires anywhere from January 1948 to November 1948,you may get the Premium Book free by merely renewing your membership at this time. All memberships will be for a full year from your present expiration date.

"Esperanto: The World Interlanguage" is nicely bound in grey cloth with green imprint. It is really six books in one with textbook,reader, dictionaries,story of Language and Interlanguage,and a new unique feature which is a guidebook to Esperanto use throughout the world. Retail price is $3.00.

Random comments on this new book to date sound something like this: "Congratulations on a very effective and fine appearing book." "It has a nice format,is well printed and contains a wealth of information." "It is really much nicer than I thought it would be." "It is grand to see an Esperanto book published in America to appeal to the average American." "It seems to be exactly what we need." YOU NEED IT TOO!

AMERICAN ESPERANTIST BULLETIN

114 WEST 16 STREET, NEW YORK 11, N.Y.

EDITOR: George Alan Connor
STAFF: H.S.Harris, H.M.Harrison, Evelyn Kromberg, W.Vathis

## WORK TOGETHER - WIN TOGETHER!

The 38th EANA Congress held recently in Toronto brought to a close the fiscal year. With this issue of the Bulletin we are entering a new year of work and progress for Esperanto. Let us not forget that the progress will be in direct proportion to the work accomplished.

Among the Association's plans for development in the new year is the closer coordination of membership and club activity through the AE Bulletin.Your unanimous and whole-hearted reception of the Bulletin has already indicated your approval, and has justified our faith in your desire to cooperate.

One of the steps in the proposed new program of coordination will be to have each club appoint or elect a representative who will send in regular reports to the Bulletin for "Membraj Aferoj".We also welcome longer feature articles from the representatives on club events of particular importance. We know that you will cooperate in this plan even before the specific program is presented in the Fall.

The first page of this issue features an article about a recently organized club in Missouri which will be of interest to all. As new clubs are organized,we would like to receive similar reports as well as ideas from all individuals on methods of organization, formation of classes and community activities.

The Resolutions Committee of the 38th Congress resolved that the Executive Committee shall recognize EANA representatives and clubs.After official recognition they will be authorized to use a special endorsement stamp on their stationery and their names shall be made public. We hope that each new club that is organized will follow the example of MOSAMO (Page 1)and immediately help to strengthen the Association by becoming affiliated with EANA and receiving its official approval.In the program it will be explained just how the Central Office will extend its help to those clubs who are officially a part of the Association.

We are grateful for your enthusiastic response to the Bulletin and the support you have already shown.Therefore,we pledge our support of your activities through the Bulletin, so that a concentrated effort towards the furtherance of Esperanto may be achieved.

* * * * *

ANOTHER POLL FAVORS ESPERANTO! The Hungarian weekly "Uj Magyarorszag" reports an experiment made by the Hungarian Opinion Poll. The Budapest public was asked for their opinion of the Esperanto language. Among other conclusions, it was found: that 86% of the Budapest public approves of an international language --45.6% would be willing to learn it if 3-month classes were started for them to learn it. Also, 75% thinks it would be practical to teach Esperanto in school so that each child could learn it. Finally, on the question of Esperanto and world peace, 60% believed that Esperanto would be of help in that field, 34% thought it would make no difference, 8.3% had no definite answer and only 1.5% thought that Esperanto would be harmful to peace. A short time ago, several alert gesamideanoj sent three United Press clippings to the Central Office informing of the teaching of Esperanto in the Hungarian "general schools" which correspond to the American grade schools.

THE FOURTH CONVENTION OF URUGUAYAN TEACHERS met in Montevideo last January and unanimously adopted a resolution expressing the desire that "Esperanto be accepted officially by UN and UNESCO,as a neutral and easy language,with the aim that it serve as an auxiliary language among all peoples".Furthermore,the resolution states that "until the acceptance of Esperanto becomes a reality,this Federation (of teachers) demands that Spanish,a language spoken by twenty nations, have the indisputable right to figure in all occasions among the official languages of both universal institutions".

### NOTICE

During the month of August,the Central Office will be unable to respond to correspondence,due to absence of the Secretary and the Assistant who are on their vacation. You may expect replies immediately after their return,about Sept.1st.

## LA AGLO-OKULO VIDAS



En unu de la lasteaperintaj gazetoj de norda Eŭropo --ni ja ne perfidos la landon --ni legis tre interesan raporton pri esperanta kunveno ĉe la hejmo de samideano. Estis la kutima novaĵraporto,sed la artikoleto finiĝis per la informo, ke la tre bonkora kaj gastama samideanino regalis la ĉeestantaron per kafo,kukoj kaj vino! Imitinda ekzemplo,ĉu ne?

Ni legis, ke iu raportisto por sveda tagĵurnalo verkis artikolon en kiu li asertis, ke dana pastro verkas la unuan literaturan libron (?) en Esperanto. Estas plezure aŭdi, ke finfine la verdstelanoj posedos ion por legi en sia lingvo; sed mi nur iom scivolas ĉu mi povas trovi lokon sur mia librobreto por tiu libro; mem mi havas tri cent librojn kiujn la "akurata raportisto" povas vidi okaze de vizito al mi.

Kaj ĉu vi scias, ke foje oni faris klopodon disvastigi Esperanton inter la eskimoj kaj eĉ eldonis gazeton "Eskima Esperantisto"? Bedaŭrinde,laŭ la Enciklopedio de Esperanto, la provo tute malsukcesis.

Ankaŭ ni rimarkas en la sveda esperanto-gazeto,La Espero,artikolon kiun verkis angla samideano,en kiu li forte asertas,ke angloj ja posedas humorsenton.Preterpase,li diras, ke por la angloj, la usonaj ŝercoj tute ne estas kompreneblaj. Responde al li, mi diros tion kion scias ĉiu usonano, nome: Neniam rakontu ŝercon al anglo je sabatnokto.Li kaptos la humorsencon dimanĉmatene kaj komencos forte ridi en la preĝejo.

### RAPORTO DE MALMO

Laŭ raporto de la 33-a Universala Kongreso Komitato estis 1400 kongresanoj el 31 landoj. Inter la landoj reprezentitaj estis: Brazilo, Ĉilio, Palestino, Sud-Afriko, Nov-Zelando, Aŭstralujo, Egiptujo, Venezuelo, Trieste.

Inter la novaĵoj pri la kongreso ni sciigas ke laŭ decido de la urbkonsilantaro de Malmö ĉiuj kongresanoj rajtos senkoste veturi per la urbaj tram-kaj aŭtobuslinioj dum la tuta kongresa semajno. Kaj ke la urbo Malmö iun vesperon regalis la kongresanojn per te-supeo.

## MOVADO KRESKAS EN AMERIKO

Lastatempe montriĝis signoj de intensa laboro en landoj kiuj ĝis nun estis iom neaktivaj rilate al la Esperanto movado.Ĵus ni sciiĝis ke la gesamideanoj en Bolivio fariĝis sufiĉe multnombraj por fondi la unuan esperantistan organizaĵon en tiu lando,la Bolivia Esperanto-Asocio. La prezidanto estas S-ro Jose Antonio Arze kaj la sekretario estas Roberto Olmos Lucia.Ili entuziasme laboras,kaj esperas ke ili povos kontribui ion al la venko de la internacia lingvo en la Nova Mondo. .... En Guatemala, nove-veninta belgo, S-ro Jules Bonge, propagandas la interlingvon kaj depost kvin monatoj publikigis esperantistan kronikon en la tieaj gazetoj.La rezulto de tiu laboro estis starigo de esperanta klubo, kredeble la unua en Centra Ameriko de multaj jaroj. .... Kaj en Caracas,Venezuela, la geesperantistoj lastatempe fariĝis agemaj. La ĵurnalo de tiu urbo,EL UNIVERSAL,la 6an de Oktobro pasintjare publikiĝis longan artikolon pri Esperanto kun portreto de Profesoro Benito Losada,donante informon pri Esperanto kaj la klopodoj organizi la esperantistojn de la lando. .... Krome,ni rimarkas la aperon de delegitoj de UEA en Ĉilio, kaj estas jam sciate ke ekzistas bonaj esperantaj organizaĵoj en Urugvajo,Argentino kaj precipe Brazilo, kies registraro bone subtenas la tiean asocion. Resume, nova progreso en la nova mondo!

.... Dum la dekunua brazila kongreso kiu okazis en Sao Paulo pasintseptembre, oni inaŭguris tien "Esperanton-straton" kaj de S-ro Oswaldo Leite de Moraes, prezidanto de la tiea esperanta klubo, ni ricevis foton kiu montras la ŝildo kun la vortoj "Rua Esperanto". Interesa kaj utila laboro.

### KOLEKTO DE PETSKRIBOJ DAŬROS

Laŭ plej freŝdata informo la kolekto de "Petskriboj" al UNO daŭros ĝis Decembro 1948. Vi ankoraŭ havas oportunon por kolekti vian kvoton! La Centra-Oficejo havas provizon de la subskribiloj, kaj volonte sendos kvanton al vi por via uzo. Nur peti kvanton laŭ via bezono de EANA.

GEM PHOTOGRAPHS
Perfect copies from any size photo or snap shot.
Size 1 3/4 x 2 3/4
On heavy weight photo paper.
25 for $1.50 -- 50 for $2.00
ORIGINALS RETURNED UNHARMED


JOSEPH LEAHY
1754 Lanier Place Washington 9 D.C.

MEMBRAJ AFEROJ
Esperanto Association of North America

# KLUBOJ

LOS ANGELES,CALIFORNIA: La Esperanto-Klubo de Los Angeles raportas,ke ili regule kunvenas dum la jaro kaj amuzas sin per instruaj paroladoj en Esperanto. La Klubo estas ankaŭ modelo de subteno de la Centra Oficejo. Ili regule sendas Patronan Membrecon en la nomo de la Klubo.Diversaj individuaj membroj estas Patronoj kaj du personoj en la grupo estas membroj de la Subtena Komitato de AE kaj la Centra Oficejo.

CORVALLIS,OREGON: En Corvallis, Oregon, ankaŭ troviĝas nova, malgranda Esperanto-grupo.La membroj diligente studas la lingvon, kaj esploras rimedojn por antaŭenigi Esperanton inter siaj kolegoj en la Kolegio.Profesoro Bruce Hahn estas prezidanto de la Klubo,kaj du aliaj profesoroj,sub la lerta gvidado de Sro J.M.Clifford,partoprenas en la agado.Ni anticipas de tiu laboro multan bonon por la progreso de Esperanto.

NEW HAVEN,CONNECTICUT:Nova esperanta klubo en tiu urbo estas fondita de brita junulo,Ralph Lewin,kiu ĉeestas Yale Universitato. Kvankam malgranda, la grupo entuziasme lernas, kaj kolektis konsiderindan nombron da petskriboj.

# PERSONOJ

...En nia lasta numero ni raportis pri la agado de Samideano GILBERT KICKEL inter la Rotarianoj. Nun ni aŭdis ke la 20an de Aprilo li faris paroladon pri nia lingvo antaŭ la "Virina Klubo" de Newport,Delaware. La aŭdantaro konsistis de sesdek virinoj. .... La "Washington Star" je dato de 11a Aprilo portas bildon de nia konata estrarano JOSEFO LEAHY, kiu,malgraŭ siaj 79 jaroj daŭre vizitas la veteranajn hospitalojn, kaj instruas la tieajn veteranojn pri la diversaj aspektoj de la fotografarto. Tio certe estas bona laboro,ĉu ne? .... En la Universitato de Kansas City, Missouri, kie nia S-ano EUGENE THOMPSON instruas francan kaj hispanan lingvojn, Doktoro W. SOLZBACHER, Vic-prezidanto de EANA, veninta en la urbon por prelego,vizitis francan kurson de Sro Thompson la 14an de Novembro. Li babiladis pri Esperanto kaj la lingva problemo en la internacia vivo,ekzemple en la Unuiĝintaj Nacioj,parolante en franca kaj angla lingvoj kaj fine en Esperanto. .... Religiaj gazetoj en Usono kaj Kanado sufiĉe ofte en la lasta tempo atentigis pri Esperanto. "The Sign", Union City,N.J., unu el la plej gravaj katolikaj revuoj, estis represinta el "American Mercury" parton de artikolo diranta, ke la angla lingvo estas preskaŭ universala. En la Novembra numero ĝi empresis trafan respondon de A. P. MACDONALD el Suffield,Alberta, kiu klarigis,ke "la mondo jam trovis la idealan internacian lingvon:Esperanto". .... La "Classmate",eldonita de la metodista eklezio,enhavis en numero de Majo,1947,artikolon pri Esp-o. Ĝi estis verkita de nia kanada samideano PHIL SHACKLETON. Ni salutas S-on Shackleton pro tiu bona laboro. .... De Canton, Illinois, ni ricevis treege interesan priskribon de malnova S-ano ROGER P. HELLER. Li lernis Esperanton en la jaro 1908 de la konata"North American Review",kondukis kursojn en Bethlehem,Pa.,kaj Nov-Jorko.En Nov-Jorko li kunlaboris kun S-ro JOSEPH SILBERNIK, la bo-frato de nia Majstro. Kiel delegito li partoprenis la Sesan Universalan Kongreson en Vaŝingtono, 1910, renkontis kaj gvidis la eminentulojn inter kiuj estis la Majstro kaj sia edzino. Certe nia samcelano havas multajn memorojn pri la fruaj tagoj de Esperanto en Usono, ĉu ne? .. .. Inter la vizitantoj al la EANA oficejo estis S-ro ROBERT EADIE de Chicago, kiu kaptis la okazon aĉeti sian kongreson bileton por Toronto;kaj Ges-roj DAN CHABEK de Cleveland,kiuj partoprenas esp-o-kurson tie,kiun gvidas samideano G.WAGNER. .... Nia juna samideano en Spokane, Washington, sendas al ni artikolon pri Esp-o kiun li verkis por la lerneja ĵurnalo de Gonzaga High School. Amiko kaj li lernas la lingvon internacian per Linguaphone kaj faras bonan progreson. .... Inter la multaj novaj membroj de EANA troviĝas gesamideanoj kiuj ĵus atingis la Novan Mondon.Tuj kiam eble,ili aliĝas al la Nord-Amerika organizo tiamaniere donante efektivan helpon al nia movado. Ĵus fariĝis membro de EANA, S-ro FRANK E. ENSKAITIS de Litovujo, nun loĝanto de Rodney, Kanado. Ni kore bonvenigas lin. .... Laŭ sciigo de nia PREZIDANTO CLARKE, akiris la Ateston pri Kapableco kun rajto de daŭra instruado Sinjoro FERDINAND R. CARLSON de Seattle, Wash. Ni kore gratulas. .. .. Nia kunlaboranto en Ĉinujo,Pastro Johano B.Kao informas nin ke li iom sukcesas en siaj klopodoj por Esperanto.Oni esperas unuigi la disajn grupojn en nacian organizon, sed mankas al li lernolibrojn, legolibrojn kaj gazetojn esperantajn por interesigi la komencantojn aŭ por montri ilin en ekspozicioj de propagando.Do, se la gesamideanoj posedas iajn tiajn presaĵojn kiujn ili ne plu bezonas, estos bona helpo al nia amiko ricevi ilin.La adreso de Pastro Kao,141 Chungking Road Southern, Shanghai,China.

# KURSOJ

PORTLAND,OREGON: Denove okazis pasintjare kurso en la Ŝtata Kolegio de Oregono en Portland. Laŭ letero de S-ro J.M.Clifford,kiu gvidis la kurson, la laŭdo por tiu rezulto devas iri al la "Sinjorinoj" de la Portlanda Klubo, kiu multe laboris por sukcesigi la enlistigon de membroj. 15 personoj partoprenis en la kurso.

DENVER,COLORADO: Eŭropa vizitanto, ĉifoje el Svedujo, Edith Bohlin, klopodas revivigi la gesamideanojn tie kaj komencis malgrandan klason.

GALT,ONTARIO: Galt Esperantista Societo informas, ke Esperanto kurso okazis dum la vintro sub la gvido de Samideano G. Clayton en tiea publika biblioteko. La sekretario de la societo, Samideano Herbert Koppel, kiu antaŭ la milito estis estrarano de la Aŭstria Esperantista Federacio,nun translokiĝas al Aŭstralio.

MILWAUKEE,WISC.:Raporto de Tony Nabby menciis, ke Esperanto-kurso funkcias en Milwaukee dum la pasinta aŭtuno kaj vintro.

## SUBTENA KASO DE AE KAJ EANA

Ni tre danke raportas ke tri novaj membroj aliĝis al la Subtena Komitato de American Esperantist kaj EANA: Anonima Okcidente, $5 monate; Tony Nabby kaj William H. Gix, $3 monate. Ili ne nur sendas bonan monhelpon, sed regule, en ĉiu letero aldonas kuraĝigajn kaj inspirajn vortojn. Aliaj samideanoj, kiuj lastatempe sendis kontribuojn al la Kaso estas jenaj: George Kirsch, $14; Esperanto-Societo de Detroit, $10; Doktoro Fritz Redl, $10; C. C. MacDonald, $6.50; Arnold Pennekamp, $4; Arthur E. Warren, $3; Ross S. Kavaner, $2.35; Sidney Culbert, $2.22; H. Schroeppel kaj Leo Tanaka po $2; Julia May Leach, $1.55; Albert Whitworth, $1.40; Raymond C Canon, $1.20; William Pickens, $1; W.D.B. Hackett, Fabian Jacynia, Eugene Thompson, Jr. po $.50; Richard Earnhart, $.35. Ni elkore dankas al ĉiuj!

# Deziras Korespondi

Kosto:Eksterlande- 2 resp.k.;Enlande- 5 cendoj -1 vorto.

ARGENTINO: S-ro Francisco Lenz, Montivideo 980 - III, Buenos Aires. Dez. interŝ. PM kun seriozaj samideanoj per katalogo Yvert-Tellier aŭ Scott. Ĉiam respondas.

BRAZILO: Manuel Rodrigues de Carvalho, Auto Piauiense Ltda., Cxa. Postal 8, Teresina, Estado do Piaui. Dez. kor.

ĈEKOSLOVAKIO: F-ino Jindra Konejlova,Rozumov 44,Turnov. 19-j f-ino en malgranda vilaĝo dez. kor. tutmonde.

ĈEKOSLOVAKIO: Jose. Forman, Madriska 22, Prague XIII. Studento dez. kor. tutmon

ĈEKOSLOVAKIO: F-inoj Maria kaj Jitka Zahourova,nam dr.E.Benese 4, Karlovy Vary, Rybare. 21-j Maria kaj 16-j Jitka dez. kor. kun amerikanoj. Respondo garantiata.

DANUJO: Frans Janger, Italiensvej 45, Copenhagen S. 24-jara mekanisto, kun Usonan(in)oj precipe el Nov-Jorko.

FRANCUJO: S-ro Pierre Bouquerel,74 rue Verdun,Bagneux,Seine, Paris. Dez. interŝ. PM kun ĉiuj landoj.

GERMANUJO: Richard Bohnert,20a Adenstedt,uber Alfeld (Leine) Brita Zono. Mia kampo la mondo! Kiu skribos al mi?


GERMANUJO: Fritz Meves, Methildenstr.85,Bremen 23, U.S.Zono. Dez. kor. kun gesinjoroj de USA, 31-jara.

HISPANUJO: Carlos Mestre, Apt. 117, Castellon. Dez. interŝ. hispanajn poŝtmarkojn.

NEDERLANDO: G. Keet, j.v.d. Heyden str.109, The Hague.Kelkaj el la 3/4 milionoj membroj de Katolika Laborista Movado en Nederlando dez. kor.

SVEDUJO: Sven Gullberg, Helgeandsg.18c III,Lund. Dez.interŝ. il. PK kun la tuta mondo.

ĈEKOSLOVAKIO: Miloslav Ivara, Dominikanska 6, Plzen. Junaj Esperantistoj dez. kor. kun Usonaj samideanoj.



**KRUC-VORTA ENIGMO** Solvo en la venonta Bulteno.

HORIZONTALE
1. Verbo plej uzita.
6. Loko.
9. Akiri per mono.
14. Aeranimalo.
15. Iamaniere.
16. Bordo de geometra figuro (radiko).
17. Poemo.
18. Apartenas al li.
20. Estrarejo.
22. Vi kaj mi.
23. Prapatro.
24. Akute.
25. Ledprocedo (radiko).
26. Dukonkulo.
28. Lerteco.
29. Subteriĝi.
30. Ia objekto.
31. Civito.
32. Konjunkcio.
33. Junulo.
35. Terceto.
36. Trumpetoj.
39. Konjunkcio.
40. Sidejo.
41. Rakontu.
42. Maljes.
43. Neekstrema.
45. Tute.
46. Je li.
47. Instrumento.
48. Pridemando.
49. Artikolo.
50. Lasto.
52. Viando. (radiko).
53. Duone stari.
56. Kia la umo estas.
57. Lageta animalo.
58. Akuzativo de io.
59. Malvira (sufikso).
60. Serpenta movado (participo).
62. Senfrukta (radiko).
63. Specialisto (sufikso).
64. Turkaj oficistoj.
65. Homoj.
67. Ofensive.
69. Embrio.
70. Ĉi-momente.
71. Muzika voĉo (radiko).

VERTIKALE
1. Malmola nigra ligno.
2. Uzis seĝon.
3. Preter sufiĉa.
4. Daŭro (sufikso).
5. Fino de problemo.
6. Demonstrativo.
7. Loko.
8. Prefero.
9. Supre.
10. Pro tio ke.
11. Listojn.
12. Lacigas.
13. Kaŝa sarkasmo (radiko).
19. Aĵo.
21. Titolo.
23. Kolekto.
24. Granda planto.
27. Demonstrativo.
28. Kanto.
29. Igu.
31. Necesega.
32. Entuziasmo.
33. Nedefinita tempo.
34. Paro.
35. Grundo.
36. Pridemando.
37. Persono.
38. Vidu.
40. Sidejo de rajdisto.
41. Malplenigi (radiko).
44. Potencej (o).
45. Malpuŝo.
46. Akorde.
48. Arion.
49. Fabrikŝtofo (radiko).
50. Ĉasi (radiko).
51. Fantazie.
52. Junko (radiko).
53. Scii (participo).
54. Danĝero.
55. Meze de.
57. Fiŝo.
58. Korelativo.
61. Frukto (radiko).
62. Dua persono akuzativa.
63. Korelativo.
66. Ekkrio.
68. Trinkaĵo (radiko).

de R. E. ROBICHAUX




VIVO DE ZOLA...de A.da Silva...el la portugala tradukis Manuel de Freitas...eldonis Portugala Eldona Rondo, Porto... 106 paĝoj...akirebla ĉe EANA...prezo, 75¢, papera kovrilo.

La Portugala Eldona Rondo, kiu jam prezentis al la Esperantistaro diversajn interesajn kaj kulturajn kajerojn nun aperigas sian unuan veran libron,kaj bona libro ĝi ja estas. Emilo Zola estis idealisto.Kaj eĉ pli grave,batalanto por siaj idealoj.Kie ajn sin trovis la maljusteco,tiuloken alkuris Zola por batali kun sia armilo--la plumo. La sociordo,la armeo,la eklezio,la politikistoj kaj ĉiuj aliaj vivkampoj kien enpenetris la korupto,senescepte sentis la efikon de tiu vipplumo kiu rifuzis estis silentigata,malgraŭ ĉiuj klopodoj inklusive de ekzilo. Zola estis vera homarano kiu plenenergie baraktis por plibonigi la sorton de siaj kunhomoj.

Lingve la libro estas bone verkita kvankam mi rimarkas diversloke kelkajn novajn vortformojn. Se "babuŝoj" signifas kaptukojn kaj "karito" almozdonadon, mi ilin bonvenigas.Resume, la vivo kaj faroj de tiu granda franco meritas esti de ĉiuj legata. --WPV


AMERICAN ESPERANTIST BULLETIN
114 WEST 16 STREET, NEW YORK 11, N. Y.
Return Postage Guaranteed





S-ro Jan Poplawski
Zakret 9
Poznan 8, POLAND


BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL